**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 2/1977 - 11 jan 1977
Aperas ĉiusemajne

Semajno de
Internacia
Amikeco 1977
************
Salutu per
anonceto en
Pilo-Press!
Detalojn legu
en PP 1/77, p.3

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



## Universala Esperanto-Asocio
## Estrarkunsido de la 7-a ĝis 9-a de januaro 1977

Rotterdam (uea/pp) - De la 7-a ĝis la 9-a de januaro, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UE) okazigis sian kutiman jarkomencan kunsidon en la Centra Oficejo de la Asocio en Roterdamo. Ĉeestis ĉiuj estraranoj, la Direktoro de la CO kaj la Redaktoro de la revuo. La Estraro pritraktis dum tri tagoj tre ampleksan tagordon, kaj rimarkis, ke la laboro de la Asocio bone evoluas sur ĉiuj kampoj. La kunsido rezultigis plurajn tre gravajn decidojn por la estonteco de la Asocio.

Jen la ĉefaj decidoj kaj komentoj pri kelkaj eroj:

1. La Estraro notis la jenajn perpoŝtajn decidojn faritajn post la Atena kongreso kaj antaŭ la nuna kunsido.

(a) UEA aŭspicios la venontajn Internaciajn Feriajn Kursojn en Elsinoro, Danlando.
(b) La revuo La Monda Lingvo-Problemo havos novan titolon ekde la nova volumo (plurlingvan): Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado.
(c) UEA donos sian aŭspicion al antaŭkongreso de la Universala Kongreso en Rejkjaviko, kiu okazos en Stirling, Skotlando.

2. La Centra Oficejo

(a) Per akcepto de baza ofica priskribo de nova Direktoro pri Esploroj kaj Planado, la Estraro starigis tiuteman novan fakon en la CO, kiu okupiĝos pri la scienca evoluigo de Esperanto kaj la solvado de la lingva problemo, la planado kaj informatiko de la Asocio, kaj la gvidado de la Financa Programo de la Esperanto-Movado. Al tiu nova posteno la Estraro nomis d-ron Victor Sadler.

(b) La Estraro starigis rekonceptitan postenon de Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo kaj nomis al tiu posteno s-ron Mikulaŝ Nevan, Nederlando. Tiu posteno anstataŭas la antaŭan postenon de Direktoro de la Centra Oficejo, kiun okupis d-ro Sadler. La Ĝenerala Direktoro okupiĝos pri la interna funkciado de la CO, la evoluigo de la agado de la Asocio kaj la servoj al la membroj, kaj la ĝenerala administrado.

(c) La Estraro pritraktis ankaŭ la oficon de Konstanta Kongresa Sekretario, por kiu prezentiĝis pluraj kandidatoj, sed ankoraŭ ne venis al decido (tiun funkcion momente ankaŭ plenumas d-ro Sadler, kun helpo de s-ro Milojeviĉ).

(ĉ) La Estraro pristudis la demandon pri translokiĝo de la Centra Oficejo al Bruselo aŭ Antverpeno kaj decidis daŭrigi siajn esplorojn. Definitiva decido ne estis farita.

(d) La Estraro iniciatos esploron pri la grado ĝis kiu la diversaj landaj asocioj havas sistemojn de t.n. apogantoj (simpatiantoj al Esperanto aparte ligitaj al la asocioj) kaj sistemojn similajn al tiu de UEA pri Asociaj Membroj.

daŭrigo sur p. 2

UEA - Estrarkunsido (daŭrigo)

3. Financo

(a) La Estraro notis, ke la financa jaro 1976 finiĝis per profito. La kontoj estas ankoraŭ ne finkalkulitaj, sed pozitiva rezulto estas pli-malpli certa. Same la 61-a Universala Kongreso (Ateno) montros pozitivan financan rezulton.

(b) La Estraro akceptis rekomendojn de la Komisiono pri Financo kaj Administrado pri la konturoj de la buĝeto por 1978. Post trijara stabileco, estos necese iom altigi la kotizojn - je verŝajne 10 %. Tiu altigo estas konsiderinde malpli alta ol la efektiva kresko de kostoj. Kompense, ekstereŭropaj membroj notos kun plezuro, ke la nova buĝeto antaŭvidos aerpoŝtan sendadon de la revuo al ĉiu membro ekster Eŭropo sen aldona pago.

(c) La Estraro fiksis kiel limdaton por la transpago de kotizoj de Asociaj Membroj al la CO la finon de junio de la koncerna jaro. La sumo estu kompreneble bazita sur la nombro de membroj en la koncerna asocio je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro (kiel ĝis nun).

(ĉ) Oni kun plezuro ricevis informojn pri diskutoj inter landaj asocioj kaj UEA pri eventuala kolektiva abonado de la revuo, kaj decidis daŭrigi la pozitivan politikon tiurilate.

(d) Oni fiksis regulojn pri kompenso de kostoj de komisiitoj kaj komisionanoj de UEA.

(e) La Estraro aprobis planon pri starigo de grupo de konsilantoj al UEA pri la Financa Programo. La grupo estos establita post ekfunkcio de la nova Fako pri Esploroj kaj Planado. Temos pri eminentaj homoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, kun aparta sperto pri financaj aferoj kaj la evoluigo de kulturaj organizoj.

4. Eldonaĵoj

(a) La Estrara Raporto aperos en la junia numero de la revuo ĉi-jare. La Estraro decidis signife koncizigi ĝin por ebligi pli varian enhavon en la koncerna numero.

(b) La Estraro akceptis proponon pri eldono de la Plena Analiza Gramatiko de Esperanto de K. Kalocsay kaj G. Waringhien kaj rajtigis la Direktoron aranĝi subskribon de kontrakto kun prof. Warnighien. Temos pri reviziita kaj kompletigita eldono de la Plena Gramatiko. Oni esperas pri eldono en 1978.

(c) La Estraro ankaŭ akceptis proponon eldoni la neniam eldonitan poemaron de Kalocsay, Izolo, kun antaŭparolo de William Auld, kiel omaĝon al la forpasinta grandulo de la Esperanto-literaturo.

(ĉ) Oni akceptis la proponon eldoni la prelegojn de John Wells, faritajn en Ateno dum la 61-a Universala Kongreso, Esperanto kaj Lingvistiko. La libro aperos kiel eldono de CED.

5. Kongresoj

(a) La Estraro ricevis tre kuraĝigan raporton pri la stato de aliĝoj al la Universala Kongreso en Rejkjaviko kaj pri la evoluo de la preparlaboroj. La Dua Bulteno estas nun finredaktata.

(b) La Estraro formaligis jam prezentitan proponon: ke la temo de la Rejkjavika kongreso estus "La rajto je komunikado". Ĝi komisiis al d-roj Tonkin kaj Pool la ellaboron de la detaloj de la aranĝoj ĉirkaŭ tiu temo.

(c) Oni definitivigis akcepton de la invito kongresi 1979 en Lucerno, Svislando, kondiĉe ke estu kompletigitaj ĉiuj formalaĵoj.

UEA-Estrarkunsido (daŭrigo)

6. Kulturo

(a) La Estraro notis kun bedaŭro la jam delonge esprimitan deziron de d-ro Wells retiriĝi kiel Sekretario de la Internacia Ekzameno, kaj nomis s-ron William Auld kiel novan sekretarion, kun komisio plifortigi kaj renovigi la Ekzamenon.

(b) La Estraro aŭdis raporton pri altigo de la lingva nivelo de la membraro kaj notis la neceson dediĉi pli da atento al tio en la agado de la Asocio.

(c) La Estraro decidis fari sian eblon subteni la infangazeton JUNA AMIKO per anoncoj kaj informoj en la eldonaĵoj de la Asocio.

(ĉ) La Estraro decidis doni aŭspicion de UEA al nova traduka konkurso lanĉita en Britujo kaj Usono por anglalingvanoj, kaj al la tradukaj branĉoj de la Konkurso Larius, Italujo. Tiu aranĝo validos dum la jaro 1977. Ĝi reprezentas novan politikon de UEA: instigi al la diversaj lingvogrupoj la aranĝadon de tradukaj konkursoj similaj al la iamaj tradukaj branĉoj de la Belartaj Konkursoj, por tradukoj en Esperanton.

(d) La Estraro nomis s-inon Eliza Kehlet, Danlando, kunordiganto de UEA pri la familia uzado de Esperanto. Temas ĉefe pri la kunordigo de servoj ktp. por familioj kun denaskaj esperantistoj.

7. Aliaj Decidoj

(a) La Estraro nomis s-ron Verstraeten, Belgujo, estrarano de la Institucio Hodler ekde post la venonta jarkunsido de la Institucio. Li anstataŭos d-ron Bormann, kiu retiriĝos pro siaj multaj aliaj funkcioj kiel estrarano de UEA.

(b) La Estraro decidis fari la necesajn paŝojn por ĉesigi la regulan aperigon de informoj pri novaj delegitoj kaj vakaj delegitecoj en la revuo. En la praktiko, tiuj informoj estas malmulte uzataj. Estontece la informoj pri delegitoj aperos nur en la Jarlibro.

(c) La Estraro pozitive reagis al propono, ke UEA nomu parttempajn funkciulojn por gvidi aŭ helpi la laboron de UEA ĉe internaciaj organizoj en Bruselo kaj Novjorko, kaj komisiis d-ron Tonkin ellabori detalan planon.

(ĉ) La Estraro komisiis d-ron Sadler, kiel nova Direktoro pri Esploroj kaj Planado, ellabori perspektivan planon por agado dum la jardeko kiu kulminos per la centjara jubileo de Esperanto en 1987.

Rotterdam, 10-a de januaro 1977

****************************************

Homo kaj Kosmo reaperis

Ĵus aperis duobla numero, 1-2/1976, de la astronomia esperanto-revuo, Homo kaj Kosmo en amplekso de 32 p. + kovrilo. Ella enhavo:
Loko de la homo en la Universo - Ne estas nur la vivo, kio nin interesas sur Marso - Atingoj de astronaŭtiko en jaro 1976 - Kion scipovas elektrono - Kio estas - la senfino?
kaj diversaj konstantaj rubrikoj.

La prezo de ĉi tiu numero estas 3,- GM, havebla ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, PSĉhK Nürnberg 819 56-851.

N-ro 3-4/76 (kiel duobla numero) aperos en marto 1977. Oni esperas, ke tiam por 1977 la revuo denove regule aperos. (Jara abono 6,- GM!).

Esperanto en Radio

Pri la aŭdebleco

Estas bedaŭrinde, ke ĝuste dum la vintra sezono kelkaj stacioj nur malfacile aŭ tute ne estas aŭdeblaj, almenaŭ ĉi tie en Nürnberg. Tio validas por la Esperanto-elsendoj de Vieno, kiun stacion ŝajne perturbas la "Voĉo de Usono", kaj ankaŭ al la posttagmezaj elsendoj de Pola Radio, kiun regule perturbas la fortaj stacioj de Moskvo. Same la Romaj elsendoj estas nur malfacile aŭdeblaj. - Tamen la aŭskultantoj ne perdu la paciencon, ĉiama klopodado certe montros sukceson. Krome verŝajne ekde februaro la situacio pliboniĝos, kiam la tagoj plilongiĝos!

Bone aŭdebla estas Varsovio sur meza ondo 200 m, speciale je la matena elsendo, je la 6-a horo. Je tiu tempo bone aŭdiĝas ankaŭ la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo, kiu ofte elradias informojn el Pilo-Press!

Varsovio. La leterkesto alportis ŝanĝon en la ĉiusemajna konkurso. Konkurso pri la plej multaj korespondaĵoj okazos nur unufoje en la monato, nome je la dua ĵaŭdo. La unuan ĵaŭdon en la monato oni anoncas la rezulton de konkurso sub la devizo "Ni skribu leterojn pri program-aferoj". La unuan premion en la pasinta leterkesto gajnis F. W. Poppeck, Oberkirch.

En la du pasintaj rubrikoj "El la vivo de Pola Esperanto-Asocio" A. Pettyn resp. Jan Klimek parolis pri la kunsido de la ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio, kiu okazis pasintsemajnfine en Varsovio.

Aliaj programeroj de Varsovio estis: Aktualaj komentarioj pri Proksima Oriento, pri Rodezio, pri Sudafriko; felietono pri "la kultura transformiĝo de la kamparana socio en Pollando". Vere interesa estis la felietono pri"muzeo de pola popola arto en la hejmo de okcidentgermana ĵurnalisto Ludwig Zimmerer".

Svisa Kurtonda Servo. D-ro Artur Baur daŭrigis sian prelegserion pri la romanĉa lingvo. Laŭ li la romanĉa lingvo ne havas propran teritorion kaj la romanĉa popolo eĉ ne emas realigi tiun principon de lingva teritorio por la romanĉa lingvo. Kvankam jure la romanĉa lingvo estas samrajta kun la aliaj tri lingvoj de Svislando, tamen la situacio por tiu lingvo ne estas tre bona. Oni eĉ enkondukis "Romanĉan Insignon" similan al la Verda Stelo de Esperantistoj. Tiu prelego certe estas interesa por tiuj esperantistoj kiuj okupas sin pri minoritataj lingvoj, kaj el la konkludoj eble iu aŭ la alia emus revizii sian ĝisnunan starpunkton por tiu problemo.

Vatikana Radio. Bonege aŭdebla estis tiu elsendo sur meza ondo, sed supozeble ankaŭ la mallongaj ondoj estas bone aŭdeblaj pro la forteco de tiuj stacioj. Pastro Jacobitti diskonigis la "liturgian penson de la semajno". Poste sekvis informoj el la eklezia vivo kun citaĵoj el la kristnaska mesaĝo de Lia Papa Moŝto: "Se oni volas pacon, oni defendu la vivon!" Fine oni aŭdis intervjuon kun la pola helpepiskopo el Varsovio, mem esperantisto, pri Esperanto en Pollando. La intervjuito speciale aprezis la Esperanto-elsendojn el Varsovio!

Wien. Estonte estos ĉiusemajne 2 diversaj Esperanto-elsendoj en Aŭstrio. Nome la mallongonda programo, sabate/dimanĉe, kaj ĉiun ĵaŭdon sur ultra-kurtondo kaj meza ondo, je la 18,50 horo. Detaloj sekvos!

Pekino. Ĉi-foje oni povis aŭdi memoriĝan elsendon pri Ĉu-en-Lai kun muzika programo, kantoj pri la mortinta politikisto. Pekino estas ĝenerale bone kaptebla!